

1921-05-01-sergeant-fousek_1

Kara samideano,

mi dankas vin korege por via letero & por via P.K. de la kongreseto en Přelouč.

Mi tuj trovis vin & dank' al la numeroj kiujn vi skribis, mi nun povas bone imagi la vizaĝojn de kelkaj konatuloj. Mi nature laŭ tiu fotografaĵo tuj rimarkis & admiris la ĝentilan belecon de S-ino Berger. Ŝi vere ŝajnas tute ĉarma & „chic“ & li estas tute feliĉa havi tielan edzinon.

Li ankaŭ aspektas tre simpatia & bonhumora. Alia bela virina vizaĝo (ĉiam laŭ la fotografaĵo) staras tute sub via edzino. Ŝi portas neniajn harojn sur la frunto laŭ la nuna modo.

Du aliaj ankaŭ beletaj staras tute malantaŭe & portas ĉapelojn. Bela vira vizaĝo staras dekstre de prof. Pitlik, ne apud li, sed post dika homo. Li estas juste sub bela junulino kiun mi citis kiu portas rubandon pendantan en sia ĉapelo. S-ro Otto Sklenčka ŝajnas interesa ankaŭ & multaj aliaj ankaŭ. Sed tiel ofte oni malbone juĝas laŭ fotoj kiuj donas malbonan impreson

1921-05-01-sergeant-fousek_2

Via edzino ŝajnas tre serioza. Ĉu ŝi ne estas blondhara?

Estas strange ke vi povis kunigi sufiĉe da anoj en Přebouč por Kongreseto & tamen Přebouč ne estas sufiĉe granda por aĉeti pluvombrelon!!! Sendube vi estas malfacile kontentigata & deziras tre eleganta pluvombrelon & tie, vi ne povas trovi laŭ via moda gusto.

La instruistino ne ŝajnas tre inteligenta.

Mi ĝojis ricevi vian leteron. De post kelka tempo mia kutimataj korespondantoj malpli skribas & tio mankas al mi. Vere estas, ke, de Meksikujo mi povas apenaŭ ricevi respondon antaŭ 3 monatoj & tio fakto malpligrandigas la intereson.

Dankon por ĉio kio vi skribis al mi pri la Habsburg aventuro. Mi pensis ke tio estis en via lando kiel vi diris sed deziris havi vian propran opinion.

Ĉu „Scotus Viator“ estas la ĉeĥa nomo por „Scott Watson“? Kial oni ne povus diri tian nomon kiel ĝi estas? En France ni ne ŝanĝas fremdajn nomojn. Oni povas elparoli ilin en franca maniero sed, ekz.: Lord Byron & Shakespeare estas skribataj same.

1921-05-01-sergeant-fousek_3

Viaj kursoj certe prenas multe de via tempo. Kiel vi lertiĝos en Esperanto. Mi nur faris unu kurson dum 7 monatoj en Londono & mi multe lernis tiele instruanto. Mi ne sciis ankaŭ kio estas „kardelo“ (chardonmeret france). Sed nature oni ne povas scii ĉiujn teknikajn vortojn. Mi vere bezonus skribi pli ol mi skribas ĉar mi sentas tre bone ke mi forgesas. Mi neniam parolas & krom mia kurso en Londono mi ne parolis de post la Berna Kongreso en 1913!!! Kaj en 1914 kiam mia korega amiko D-ro A. Zamenhof vizitis min hejmen dum 2 semajnoj – sed ni preskaŭ ĉiam parolis france. Li mortis en milito en 1916!

Ho! Mi forgesis! Kun Pola s-ro la lastan jaron kiu trapasis Boulognon irante Amerikon. Li opiniis ke mi parolis tamen tre flue - sed certe mi forgesas.

Ho! Kiel via Pardubica koncerto estos bela!!! Vi sendube febre preparas vin. Kian voĉon vi havas? Mi aŭdis en Krakovo belan viran ĥoron.

Estas tre malofte aŭdi tion en Francujo. Antaŭ kelkaj jaroj mi tamen aŭdis la virĥoron „des employe´s du Bon Marché“ granda Pariza magazeno. Tio estis belega. En Boulogno oni okupiĝas tre malmulte pri muziko.

1921-05-01-sergeant-fousek_4

kaj miaj muzikaj konoj & edukado bezonas esti tute refaritaj.

Mi ĉesis ludi tenison de 3 tagoj & Dimanĉon mi pasigis la tutan tagon en fortega vento sur la kamparo apud la maro en „Golf club“ kie mia edzo & alia ĉarma s-ro ludis „golfon“.

Ni revenis je la 9a vespere. Tiu golf ludo estas tre malfacila, tre bona ekzercado por la korpo. Ĝi estas vera pasio. Sendube vi ne konas ĝin.

Sur herbaĵo speciale elektita estas 18 malgrandaj truoj videblaj pro ruĝaj standartetoj apud ili. Kun specialaj bastonoj vi devas sendi kugleton blankan en tiujn truojn per kiel eble malplej da frapoj. La tuta tra irado de truo N-o 1 ĝis truo N-o 18 okupas ĉirkaŭ 2 kilometroj. Estas sporto multekosta. Ĝenerale oni faras de 80 ĝis 150 bastonfrapojn entute. Do, dimanĉo mi malvarmumis & havis doloran gorĝon & nun mi tudas sed mi esperas post ankoraŭ unu aŭ du tagoj reeliri.

Pluvas tre forte. Kiel la printempa kreskaro odoras bonege post pluvo, ĉu vi ne opinias.

Matene mia filo kolektis amason da kutiso (cythise, flavaj floroj) kaj nun mia ??? estas tute tute flava. Mi amegas florojn, kaj vi?

1921-05-01-sergeant-fousek_5

Ĉu vi jam estas en Italujo?

Sur la lagoj? Kiel ili estas belaj!!! Mi jam vizitis „les Iles Borromeés“ sur „le lac Majeur“

Kian belegan kreskaron oni vidas & flaras.

Mi korespondis dum kelkaj monatoj kun pentristo de Udine. Sed li ĉesis kiel tiel ofte la esperantistoj ĉesas. Sed mi ne tre malĝojis ĉar li nur sendis P.K. Kaj mi pli ŝatas leterojn. Poŝtkartojn plaĉas al mi sed de tempo al tempo nur.

Oni preparas festojn tie por datreveno de la morto de „Napoleon“ kaj mia edzo estas furioza. Li tute maladmiris lin & malkontentiĝas kontraŭ nia nuna registraro kiu permesas kaj aprobas tion. La Rom.katolikoj fine sukcesis havi kion ili deziris de longe: 2-an nacian tagfeston: la festo de „Jeanne d'Arc. Tio ankaŭ malplaĉas al ni. Kial do festigi junulinon kiu certe estis freneza kvankam ŝi iris sur la batalempojn. Ŝi aŭdis voĉojn sanktajn en la arbaro!!! & nun oni nacifestigas ŝin

1921-05-01-sergeant-fousek_6

Ĉu ekzistas protestanta preĝejo en Přelouč?

Sendube jes. Mi estis Prot. sed nun mi ne estas. „Fari al aliaj tion kion vi dezirus ke oni faru al vi.“ Ĉu ne estas bona religio?

Nun mi forlasos vin. Estas la 6-a horo vespere. Mi atendas geamikojn por vespermanĝi & ludi „bridĝon“ poste & mi devas iom zorgi pri la kuiristino kiu (kiel ĉiuj postmilitaj servistinoj) taŭgas al nenio. Do, ĝis la revido, kara s-ro, bonan sanon al via edzino & por vi plenan sukceson la 15-an de Majo.

Tutkore & sincere

Alice Sergeant